

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
oktobro-decembro 2008

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Ekstrakto el Mesaĝo de S-ro Koichiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la Monda Tago de Kultura Diverseco por Dialogo kaj Disvolviĝo—21-an de majo, 2008

El la sep internaciaj konvenoj antaŭenigitaj de Unesko por plifortigi kulturen diversecon tra la mondo, la plej novaj, nun ratifikitaj kaj validaj, eniras siavice siajn efektivajn fazojn. Tia estas la specifa situacio de la Konvencio por la Protektado de Netuŝeblaj Kulturaj Heredaĵoj (2003) kaj la Konvencio por la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj (2005), kiuj suplementas la akordon Konvencio por la Protektado de la Kultura kaj Natura Heredaĵoj de la Mondo (1972).

Ni nin trovas, do, je la fino de unu ciklo kaj la komenco de alia, pli praktika kaj konkreta. Ĉi tiu nova, kontinua agado, ŝanĝanta de vortoj al faroj, permesas ke ni pruvu ke, baze de la universalaj principoj je la centro de niaj normo-starigaj akordoj, kultura diverseco ja estas fortejo de daŭropova disvolviĝo kaj, pro tio, decidiga armilo kontraŭ malriĉeco. (...) Kulturen diversecon oni ne direktas; oni festas kaj pritraktas ĝin. La celo de ĉi tiu Tago do estas nutri kaj subteni la travivadon de ĉi tiu diverseco laŭ spirito de scivolemo, dialogi kaj pritrakti unu kun alia, kaj tiel elprovi la praktikajn eblecojn de disvolviĝo ofertataj de kulturaj entreprenoj, kreivaj industrioj, kultura turismo, kaj la protektado de kulturaj heredaĵoj.

Operaco Pliboniĝo

Unesko premiis sudafrican ne-registaran organizon kiu prezentas informojn fakte vivosavajn kaj vivodaŭrigajn. La organizo “Operaco Pliboniĝo” (anglalingva nomo: Operation Upgrade) nun funkcias en regiono de Sudafriko kie ekzistas granda elcento de nelegipoveco kaj kie okazas multjara nepluvado. Multaj viroj foriras urben por labori kaj lasas la virinojn kun la infanoj por kultivi terenojn preskaŭ tute sekigitajn. Kiam la viroj reiras al la vilaĝoj, ili ofte infektas siajn edzinojn per homa imuno-nesufiĉiga viruso (HIV), per kiu ili malsaniĝis en la urbo.

Resume: Kulturo, lingvo, kaj vivoj endanĝeritaj.

Responde je la ĵus-priskribita situacio, jen agadoj de Operaco Pliboniĝo: ---Klasoj pri la indiĝena lingvo (la zulua), la angla, kaj bazaj matematikaj scioj. ---Informado pri HIV kaj kiel la virinoj povas eviti ĝin aŭ ricevi medicinan helpon kontraŭ ĝi. ---Informado al la virinoj pri kiel uzi la malgrandan akvokvanton al ili havebla por efike kreskigi kaj produktigi siajn plantojn. (La virinoj jam vendas unu plantoprodukton al manĝaĵ-venda kompanio.)

La programo de Operaco Pliboniĝo montras kiel indiĝenaj popoloj povas daŭrigi siajn kutimojn de vilaĝa vivo kaj tradicia lingvo, sed ankaŭ lerni novajn lertecojn por povi protekti sian memstarigon. (Nun partoprenas 400 lernantoj.)

(Informofonto: Kuriero de Unesko, numero 7, 2008)

La turismo-industrio demandas: Kiuj kaj kiaj estas kulturaj turistoj? Mi antaŭe ne aŭdis pri CECA, sed mi eklernis ke anglalingve ĝi estas la “Committee for Education and Cultural Action” (Komitato por Edukado kaj Kultura Agado), internacia organizo por muzeoj. Eble tia organizo estas valora kunintereso por PIP; certe ĝi meritas enketadon. Intertempe, mi eksciis ke CECA organizis ĉi-jare internacian kunsidon pri “Kultura Turismo: Tendencoj kaj Strategioj” en Montrealo, Kanado.

Jen kelkaj diskutopunktoj arigitaj ĉe la konferenca retpaĝo: ---Novaj tendencoj: ekoturismo, ekonomie justa turismo, aŭtentika (?) prezentado... ---Kiuj estas “ĉi tiuj turistoj” de la 21-a jarcento? (Interalie, kiajn travivaĵojn ili serĉas?) ---Turistoj kaj kultura identeco. (Interalie, “vidi kiu estas la Alia”) ---Universitata esplorado kaj muzeoj ---Kial turistoj interesiĝas pri kulturo kaj lernado? ---Ĉu ni bezonas adapti lernoprogramojn por turistoj?

Ni ne preteratentu la fakton ke por multaj personoj, ekkono de indiĝena grupo okazas unuafoje ĉe muzeo. Tio povas esti persone evolua travivaĵo por la persono kaj ekonomie pliriĉiga okazo por la muzeo: Se la vizitanto/turisto sentas fortan interrilaton kun la indiĝena popolo, li aŭ ŝi eble aĉetos (en la muzea vendejo, kompreneble!) libron, videobendon, aŭ metiaĵon, aŭ eĉ vojaĝos (ĉu per grup-vojaĝo aranĝita de la muzeo?) por sperti alian lokon kaj alian kulturon.

Bonvole sendu al La Kalumeto viajn komentojn pri la diskutpunktoj de CECA!

Pri la “Universala Deklaro de Lingvaj Rajtoj” de Unesko, 1996

Komentoj pri Artikolo 2: La artikolo deklaras ke serĉe de socia-lingva ekvilibro inter lingvaj komunumoj, oni devas konsideri diversajn faktorojn pri la komunumoj krom iliaj historiaj estadoj en la koncernaj teritorioj kaj la demokratie esprimataj volo de la komunumoj. Inter aliaj faktoroj konsiderendaj estas la eble truddeviga naturo de migrado kiu kaŭzis la kunekzistadon de la komunumoj kaj la grado de atakebleco de la komunumoj.

Komentoj pri Artikolo 3: Lingvaj rajtoj individuaj kaj kolektivaj: Individuaj rajtoj: Ĉiu persono havas ---la rajton de rekono kiel ano de lingva komunumo ---la rajton de privata kaj publika uzado de sia lingvo ---la rajton de la uzado de sia nomo ---la rajton de interrilatado kaj asociado kun aliaj anoj de sia originala lingvo-komunumo ---la rajton de konservado kaj evoluigado de sia kulturo.

Kolektivaj rajtoj: Ĉiu parolgrupo havas

---la rajton de la instruado de la lingvo de lingva komunumo kaj de alirado al kulturaj servoj ---la rajton de posedo de ekvilibrigita pozicio kiel lingva komunumo en la amaskomunikiloj ---la rajton de propralingva ricevado de oficiala atento de registaraj instancoj kaj en soci-ekonomiaj interrilatoj (Komentoj verkitaj de Erik Felker)

Manifesto de Prago—Manifestero 6: lingva diverseco

“Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluiĝo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco. (El Manifesto de Prago)

Ĝuste lingvan diversecon celas PIP; lingva kaj kultura diverseco estas bazaj kaj bezonataj por ke indiĝenaj kulturoj travivu. Tamen, krom tiu preskaŭ rokece evidenta punkto, ekzistas alia, kiel fiŝo naĝanta inter rokoj. Temas pri la starpunktoj nediversec-celaj de kelkaj parolantoj (neparolantoj) de pluraj lingvoj.

“Ne parolu tiun lingvaĉon, eĉ en la ludejo! Se vi denove parolos ĝin, mi punos vin.” “Ni ne havas sufiĉe da mono por starigi klason/aperigi lernolibron pri tiu [indiĝena] lingvo.” “Ĉi tiu lingvaĉo estas la lingvo de konkeritoj/konkerintoj; ĝi enhavas nenion valoran por mi.” “La vivmanieroj ŝanĝiĝas. Ne plu ekzistas en la mondo loko por nia lingvo, do sencelas starigi revivigan programon.”

Pli mallonge dirite, la vortoj de dokumentoj povas esti tiel senvivaj kiel rokoj, sed la sentoj de tiuj, kiuj malaprobas aŭ ne subtenas diversecon povas esti tiel danĝeraj kiel grandaj, sovaĝaj fiŝoj.

Tamen, la lastaj vortoj de la manifestero informas pri ioma solvo de la afero: “Ni estas movado...” Tio estas, se la fiŝo malvarme sed forte sin movas, ni “ŝtonaj” movadoj ankaŭ nin movu. Ŝtonoj moviĝas terolavange, terotreme... sed, pli kreeme, ŝtonoj moviĝas laŭ la planoj kaj energioj de arkitektoj kaj metiistoj. Ni do konsideru ke Manifesto de Prago enhavas la konceptojn de arkitekto kiu enspiras kaj vidas la konstruadon. Ni esperantistaj metiistoj nin movu por forte konstrui egalecon, diversecon, komunikadon, memrespekton—konstruaĵojn ne el ŝtono, sed el mensoj, el koroj, el espero, energio, fokuso, vivo... Ni nin movu!

Lingva dilemo de afrikaj verkistoj

S-ino Angela A. Williams komentis en 1998 ke afrikaj poetoj havas dilemon (kaj ĉiuj plurlingvaj verkistoj kredeble havas dilemon iom similan). Ekzemple, poeto zimbabva du-rezulte verkas anglalingve:

---ŝi aŭ li sentas intelektan stimuladon pro uzado de lingvo kiu estas produkto de alia kuturo ---ŝi aŭ li legebligas sian poemon al pli larĝa legantaro.

Aliflanke, la poeto povas verki ŝona-lingve aŭ endebela-lingve, ankaŭ du-rezulte: ---li aŭ ŝi uzas unu el la lingvoj kiuj estas la plej naturaj esprimiloj por zimbabva poeto ---li aŭ ŝi limigas la tutmondan legeblecon de la poemo, almenaŭ en la originala lingvo.

Luktu per la Plumo

Viaj bovoj jam forrabiĝis, miaj samlandanoj! Savi ilin! Revenigu ilin! Preterlasu la fusilojn malnovajn Kaj prenu la skribilon. Prenu paperon kaj inkon, Ĉar tiuj estas via ŝildo.

Viaj rajtoj forrabiĝas! Do, prenu vian plumon, Ŝarĝu ĝin, ŝarĝu ĝin per inko. Sidiĝu en via seĝo, Ne iru al la fortikaĵo, sed skribile pafu.

Skribe premu la paĝon, Laborigu vian menson; Enfokusigu ĝin pri la faktoj, Kaj parolu laŭte, klare; Ne tro rapide al la batalo; La kolero fuŝparolas.

Verkis I. W. W. Citashe (ankaŭ konata kiel Isaac Wauchope) el Sudafriko. Tradukis esperanten el angla traduko: Erik Felker Tradukis anglan el la koŝa: A. C. Jordan

Kial Tiel? Ŝatataj en multaj lokoj estas rakontoj kiuj priskribas, aŭ ridetige aŭ gvide, "kial tio estas tiel"...ekzemple, kial la valabio de Aŭstralio havas longan voston. Jen rakonto de la aŭstraliaj aborigenoj kiu priskribas kial tiuj vosto longas....

Estis du junaj, bonkvalitaj viroj kiuj estis amikoj kaj kunĉasantoj. Ili konsentis unu kun la alia pri multaj aferoj, kaj tio certe agrabligis iliajn kunĉasajn tempojn.

Tamen, pri unu afero ili ne akordis. La pli malalta viro preferis tranokti en kaverno aŭ eta, dumtempa ŝirmejo. Aliflanke, plaĉis al la pli alta viro tranokti subĉiele; li diris ke tiel li plej facile povas admiri la stelojn. Misamuze, li priridis sian amikon pro tio ke ĉi tiu ĉiunokte konstruis por si etan ŝirmejon.

Unu nokton, dum la amikoj ripozis post ĉasado, pluvego ekfalis, ventego ekblovis, kaj la temperaturo tre malagrabla malsupreniris. La viro kiu kutime tranoktis subĉiele tuj komprenis ke sia neŝirmita situacio estis al li tre danĝera.

La Kalumeto—paĝo 6

Li petis al sia amiko ke ĉi tiu permesu al li eniri la etan ŝirmejon. Respondis la pli malalta viro, "Vi neniam konstruis ŝirmejon, kaj priridis min kiam mi faris tion, sed nun vi deziras ĝui la rezulton de mia laboro." La viro en la ŝirmejo ne permesis ke la alia viro eniru.

La pli alta (kaj malsekega) viro furioziĝis. Tuj li enmanigis ŝtonon kaj platige frapis la frunton de sia amiko. La pli malalta viro, terure vundita, ekprenis sian lancon kaj pintotrafis sian kunĉasanton. Ĉar la amiko penis eviti la lanĉopinton per rapida movo, la pinto lin tranĉis dorse.

La ĉielprauloj rigardis la perfortajn agadojn kaj senbridajn emociojn de la viroj. Ili decidis ke tiaj reagoj estis netaŭgaj por homoj. Tiel, la ĉielprauloj forigis la vundodolorojn de la du viroj, sed samtempe kaŭzis ke ili iĝu bestoj!

Nun la malgranda, platkapa vombato zorgeme ŝirmas sin, kaj la granda valabio kuras subĉiele; kie antaŭe troviĝis doloriga lanco nun estas longa vosto.

Du poemoj el *The Dirt Is Red Here: Art and Poetry from Native California* [La Tero Ruĝas Tie Ĉi: Arto kaj Poezio de Indiĝena Kalifornio], redaktoro (s-ino) Margaret DUBIN. (Tradukis el la angla [la originala lingvo] Erik Felker.)

La Vepro-danca Knabo Loĝas en Fenikso, Arizono

De (s-ino) Shaunna Oteka

McCovey

, Usono

Kantu al mi kantojn

pri fumo kaj radiko

portante danc-insignojn kun ornamoj ŝancelantaj. Fortiru viajn sagojn el la sagujo kiu estas mi.

Ĉi-nokte mi subĉielen iris

kaj unuafoje

ekde mia alveno al ĉi tiu

loko, for de mia hejmo, la steloj lumis pli brile ol la urbaj lumiloj, la Tero senmoviĝis kaj mi vidis vepro-dancan Knabon dancanta ĉe la plenluma luno, zorganta min kiel li ĉiam faras.

Kantu al mi sonĝojn

de fumo kaj radiko, La Kalumeto—paĝo 7

sentu la miakoran sunleviĝon

post la matena danco. Centro-cele saltu en mian animon.

Lecionoj el Fajroj

De (s-ino) Linda Noel

Mia patro faris bonajn kampofajrojn. Li instruis al mi kiel prizorgi fajrojn, kiel starigi ilin tiel ke ili povas spiri, kaj kiel la flamoj kreas braĝojn kiuj iĝas vizaĝoj aŭ okuloj aŭ fiŝoj fornaĝantaj el la flamoj per grizaj cindroriveroj. Kaj kiel la okuloj kaj vizaĝoj forrigardas al ni, finbruliĝas por ni por varmigi la aeron kiun ni spiras kaj do en nin ni glutas ĉiujn formojn kreitajn en bone prizorgita fajro.

La Daŭreco de la Kreemo

(Kanto de la otomia popolo de Meksiko)

Ili ne velkos, miaj floroj (t. e., poemoj). Ili ne ĉesos, miaj plumoj (t. e., kantoj). Mi, la kantanto, per miaj manoj altigos ilin. Ili estas disigitaj, ili sternaĝas. Kvankam surtere miaj floroj eble velkos kaj flaviĝos, ili portiĝos tien, al la plej interna loko de la birdo oropluma.

(Tradukita de Erik Felker--el angla traduko)

La Kalumeto—paĝo 8

Korakospirito

En la nacia muzeo de marhistorio de Usono troviĝas ligna kanuo zorgeme farita kaj bele ornamita. Ne temas pri antikvaĵo; la kanuon antaŭnelonge faris kaj surmare pagajis anoj de indianaj triboj de la nordokcidento de Usono.

Antaŭe, havi kanuon signifis povi kontakti aliajn homojn. Nun la indianoj tielokaj uzas motorboatojn, sed la farado de lignaj kanuoj estas tradicio de la apudmaraj triboj de la regiono, kaj evidente tiu tradicio ankoraŭ vivas.

La ĉefa ornamo de la boato estas ĉizita korako. Tute nekutime, unu flugilo de la ĉizitaĵo ne aspektas normale. Tio rezultis el pluraj vizitoj al la kanu-kreada loko faritaj de korako kiu havis rompitan flugilon. La ĉefkreinto de la kanuo decidis montri per la ĉizitaĵo la intereson kun kiu la korako ade observis la tradician laboron.

Elkorajn dankojn al tiuj kiuj komentis pri antaŭaj bulten-numeroj, kaj speciale al tiuj kiuj provlegas la bultenon!

Projekto Indiĝenaj Popoloj nun sendas aktualajn numerojn de La Kalumeto, kun nacilingva resumo, al diversaj universitatoj, fakoj de UNO, ne-registaraj organizoj, kaj aliaj organizoj kiuj celas apogi indiĝenajn popolojn. Se vi konas tiajn organizojn, nepre sendu informojn al PIP, por ke ankaŭ tiu organizo ricevu informojn pri PIP kaj ekzempleron de la bulteno. Se vi havas sugestojn por la plibonigo de la bulteno aŭ se vi havas artikolon, recenzon, tradukon, aŭ similaĵon por aperigo en la bulteno, bonvole kontaktu:

(s-ro) Erik FELKER ejfelker@dslextrreme.com aŭ 414 E. Cedar Ave., Apt. 11 /
Burbank, CA 91501 / U.S.A.--Usono